

Informoj:
Arto :- Literatura
Turismo :- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

FESTENO ĈE LA PLEJ ALTA ESTAJO

(imitaĵo al Samnoma peco el «Versaĵoj en prozo» de Turgenev, tradukita de Kabe).

Iam la plej alta Estajo donis en sia lazura palaco grandan festenon.

Ĉiuj lingvoj estis invititaj. Kune kun ili venis ankaŭ aliaj amikoj kaj konatoj.

Kunvenis tre multaj lingvoj—mortintaj kaj vivaj, naturaj kaj artefaritaj. Kiel decis al lingvoj, ili multe interbabilis; malgraŭ la malsameco ili bone komprenis unu la alian. Tio, do, estis Babelturo por la multlingveco, sed ne por la nekompreniĝeco.

Sed inter la invititoj la plej alta Estajo rimarkis du belajn personojn, kiuj, ŝajne, tute ne konis unu la alian.

La mastro prenis unu el la personoj je la mano kaj alkondukis al la alia.

«Reformo!»—diris Li montrante la unuan.—«Sukceso!»—aldonis Li montrante la duan.

Ambaŭ personoj ekstreme ekmiris: depost la tempo kiam ekzistas lingvoj, kaj longe jam lingvoj ekzistas, unuafoje ili renkontis unu la alian.

VICENTE INGLADA.

VOĈDONO DE HISPANA VIRINO

Pri voĉdono de hispana virino jam multe oni verkis antaŭ kaj post la diskuto de tiun rajton en la Parlamento. Ĉe Parlamento mem la du deputitinoj paroladis kontraŭe kaj favore. Victoria Kent opiniis pri tiel grava afero ke hispanaj virinoj devas voĉdoni, sed kiam ili havos sufiĉan civilan kapablon. Clara Campoamor defendis ilian rajtojn argumentante ke se virinoj havas samajn civilajn rajtojn kiel la viroj, laŭ la nova Konstitucio, ili ne devas esti escepto en voĉdono. Tre bone. Mi pensas same. Estas vere, bedaŭrinde, ke ni la virinoj ankoraŭ ne havas sufiĉan politikan, civilan kulturon por uzi voĉdonon; sed mi demandas: ĉu ĉiuj viroj estis kapablaj por voĉdoni kiam en Hispanujo oni dekretis univرسالان voĉdonon? Eĉ hodiaŭ, ĉu estas kapablaj ĉiuj viroj?

Tradicie oni neniam instruis la virinon pri politiko. Nur oni instruis nin pri tolajkudrado, viandkuirado, laboroj, ludi pianon, violonon k. t. p. laŭ socialaj klasoj, pensante ke tiuj konoj jam estas sufiĉaj por virino. Domage! Nun, la viroj, bedaŭras nian ignoron—ignoron pri kiu ili mem havas pligrandan kulpon—kaj krias: Ne, tute ne. Virinoj ne devas voĉdoni!

Amikinoj, samideaninoj! Vi devas voĉdoni, estas necese voĉdoni; sed antaŭ ol ni povos fari tion mi permesas konsili vin. Instruu, preparu vin por ke via voĉdono ne estu pro nescio, ilo de aliaj personoj kaj kiam vi enmetos biletan en elektan urnon restu plene konvinkitaj ke vi mem scias pro kio vi enmetas tiun biletan.

JULIA BUENO.

Zaragoza, 14 de Octubre de 1931.

Hispana Esperantista Konfederacio

Je la 6.^a horo, vespere, de la sesa tago de la proksima Decembro, kunsidos ĉe la Aragona Esperanta Federacio (strato Roda, 14 y 16, Zaragoza) la Centra Komitato de la H. E. K. Kies voĉdonantoj estas la Prezidantoj de la aliĝintaj Federacioj.

GRAVA AVISO

Oni komencis disdoni kristnaskan loterion, kaj pro tio oni rememoras al la gefratecanoj ke ili povas aĉeti ĝin al nia kasisto sinjoro Larruga, strato Convertidos, 9, Presejo, dum la tuta tago, kaj ankaŭ en nia klubo, je la oka kaj duono ĝis la naŭa vespere, sciigante ke nur estos aĉetebla ĝis la 15.^{an} de Decembro.

Ankaŭ oni komunikas al la samideanoj kiuj forgesis peti loterion, petu ĝin kiel eble plej baldaŭ, tial ke nure restas kelkajn tagojn de la nuna monato por tion fari.

RAPIDAJ INTERVJUOJ

Ĉe unu el la antikvaj stratoj de ĉi tiu urbo. Antaŭ granda domo kun pordego. Tra larĝa kaj mallonga ŝtuparo mi supreniras al la unua etaĝo kaj funkciigas sonorileton... Oni min demandas... Kion vi deziras?... Kaj mi respondas:... Ĉu estas videbla Sro. Maynar Barnolas?... Kia estas via nomo, sinjoro?... Mia nomo interesas neniun, mi nure estas esperantisto, ĉu mi povas eniri?... Subite mi aŭdas fortan sed agrablan voĉon, kiu ree diras:... Antaŭen, sinjoro... Eniru... Eniru... Mi antaŭeniras decide kaj mi troviĝas antaŭ la konata advokato kaj Honora Prezidanto de «Frateco» kiu, kun sia ĉiama afableco, ĝentile akceptas min.

Sinjoro Maynar invitas al mi sidiĝi apud li kaj ekdiras... Mi estas je via dispono, karega... «La tempo oro estas», diras angla proverbo, kaj pro tio mi komencas demandi lin:

—Estus interese, Sro., scii de kiam vi estas esperantisto.

—Sro. Maynar respondas ke li apartenas al la esperantistaro de la jaro 1909.

—Ankaŭ povas interesi al la legantoj de NIA VIVO, pro kio vi interesiĝis pri Esperanto.

—Sciu ke en mia advokata oficejo kaj por profesiaj aferoj, venis ofte kliento, kiu neniam forgesis paroli al mi pri Esperanto kaj ĉiam ankaŭ li invitis min, ke mi lernu tiun lingvon, per unu vorto, ke mi «esperantiĝu»... kiam li parolis tiel fiere, mi aŭdis lin «kiel oni aŭdas pluvon», ĝis kiam, ian tagon li venis de nove kaj lasis sur mian labortablon gramatiketon, kies aŭtoro estis Sro. Th. Cart.

Mi kutimas post longdaŭra aŭ pena laborado enlitiĝi kaj se ne povas ekdormi, mi prenas el la tirkesto de mia dormotablo, iun libron el tiuj ĵus ricevitaj kaj tiamaniere mi konas iom post iom kelkajn librajn novaĵojn.

Kaj okazis ke ifoje ne povante ekdormi, mi malfermis la diritan tirkeston kaj prenante libron, mi vidis surprize ke ĝi estis tiu kiun donacis al mi mia kliento, mi eklegis kaj baldaŭ komprenis la belecon kaj utilecon de tiu idiomo; tia estis la kaŭzo de mia esperantismo.

—Ĉu vi memoras tiujn personojn kiuj influis aŭ decidigis vin lerni Esperanton?

—Mi jam respondis al vi ke mia kliento, tamen mi forgesis diri lian nomon, li estis Sro. Agustín de Montagut; poste mia bonega amiko Sro. Emilio Gastón Ugarte (ankaŭ mortinta), sciigis min ke li estis esperantisto, kaj tio, pli kaj pli decidis en mia esperantemo.

—Tre interesus scii ankaŭ, en kiaj kongresoj inter naciaj kaj naciaj vi ĉeestis aŭ partoprenis.

—Mi partoprenis tre aktive en ĉiuj naciaj kongresoj okazintaj, jene: Barcelona, Zaragoza, Valencia, Bilbao, Córdoba, Madrid, Sevilla kaj Oviedo, kaj mi laboris precipe pri la organizado de la Hispana Esperantistaro, pro tio ke mi opiniis ke la kunigo de la fortoj certigos la sukceson. Mi ankaŭ ĉeestis en la sekvantaj kongresoj de la Kataluna Esperantista Federacio: Tarrasa, Reus, Vilanova i Geltrú, Manresa, Vich kaj Barcelona.

—Bonvolu diri al mi la plej feliĉan okazaĵon de via esperanta vivo kaj ankaŭ kiuj libroj esperantverkitaĵ ja plaĉas al vi.

—Unu el la momentoj pli feliĉaj el mia vivo, estis la donaco de la titolo de Honora Prezidanto de «Frateco», okazinta la 31^{an} de Majo de la nuna jaro. Kaj pri la libroj pli plaĉaj, mi devas respondi ke estas *La Faraono*, originala romano de B. Prus, tradukita de Dro. Kabe kaj *Hamleto*, de W. Shakespeare, ne nur pro ilia verkado sed eĉ pli multe pro ĝia traduko, mirinde farita de nia Majstro.

—Interesege estos ke vi diru, per malmultaj vortoj, vian opinion pri la interna ideo de Esperanto kaj ĉu tiu ideo promesas novaĵojn dum la nuna esperanta momento.

—Pri la interna ideo de Esperanto mi nur diras ke mi estas sampensanta kiel Dro. Zamenhof laŭ liaj belegaj elokventaj salutaj paroloj en la Dua Kongreso en Ĝenevo, 1906.^a. Ĉu tiu ideo promesas novaĵojn?... Ĝi povas helpi la interkomprenadon aŭ interamadon inter la homoj, precipe en la sociaj rondoj, nun preskaŭ en milito.

—Kaj fine, Sro., ni tre multe petas, trouzante vian pruvitan paciencon, rakontu al mi anekdoton eble okazintan al vi dum via longa esperanta vivado.

—Okazintaĵo la plej grava kaj malfacila kiun mi spertis dum mia esperanta vivado, estis en la Salonego por Solenaĵoj de la Valenciana Universitato. Okaze de la Nacia Kongreso, Sro. Vonken el Ĥina nacieco, diris la malferman paroladon, sed okazis ke multenombro el la ĉeestantaro ne konis nian lingvon, kaj malvarmo regis en la salono; sinjoroj Jordana de Pozas kaj Piñó kiuj estis apud mi, penis ke mi traduku la jusan paroladon de Sro. Vonken, kaj tiu momento estis por mi, ja terura sed mi kuraĝiĝis, kaj la parolado de Vonken, estis de ĉiuj komprenata kaj tiam la aŭskultantoj plaŭdis varme kaj daŭre.

—Ankoraŭ kaj kiel timante fini ĉi tiun intervjuon, mi pafas la sekvantan bonhumoran demandon:

—Kio plaĉas pli multe al vi, Sro., la esperantisto aŭ la esperantistinoj?

—Tute certe la esperantistinoj, ne nur pro siaj fizikaj belaj sed eĉ multe, pro sia efikega influo sur la spiriton de la viroj.

Ĉe tiuj lastaj respondvortoj, mi konsideris finata tiun interesan intervidadon kiu mi dezirus estu agrabla al la legantoj, kaj post adiaŭi al la batalanto por Esperanto Sro. Maynar, dankante liajn atenton kaj ĝentilecon, mi troviĝis denove sur la strato, preta daŭrigi kontraŭ iu ajn famulo ĉi tiujn rapidajn intervjuojn.¶

J. LARRUGA B.

KOMENCO...

ESPERANTO. La mirinda lingvo internacia kreitaĵo de Dro. Zamenhof celante la starigon de komuna lingvo kiu taŭgu krom aliaj aferoj, por kunigi plej proksime, la rilatojn inter ĉiuj popoloj.

Neniu povas dubi pri la boneco kiun la alpreno de tiu ĉi lingvo reprezentos por ĉiuj, tiom por la intersanĝoj de la nacioj kiom por alproksimiĝo de la homaro.

Tial, mi ĉiam havis grandajn dezirojn lerni ĝin, kaj dank' al la Societo Frateco de Zaragoza kaj al la facileco de la perpoŝta metodo de ĝia profesoro, mi efektivigis ĝin, ĉe mi, en tiu ĉi vilaĝo.

Mi kunhelpas kun granda entuziasmo por disvastigi nian idealon kaj kreskigi la nombron da adeptoj.

BIENVENIDO SERRANO.

Morata de Jalón (Zaragoza).

S-ro. Serrano estas lernanto nia, kiu lernis Esperanto per poŝto. Ni lin persone ne konas. La antaŭa skribaĵo estas lia unua verko en nia dua lingvo. Ĝi estas, por ni, la plej efika pago de niaj klopodoj.

KIAL MI ESTAS ESPERANTISTO?

Ĉar mia deziro estas tia. Tiu ĉi respondo estus sufiĉe konvinka se ne estus aliaj kaŭzoj, kiuj devigas min diri, la diversajn tialojn pro kiuj mi estas esperantisto.

Unu el ili estis la Profesoro. Li havis tiel eksordinarajn edukantajn kondiĉojn, ke estis neeble lasi la studon de ĉio, kion li volis instrui. Mi kredas ke same ol mi studis entuziasme la esperantan lingvon, mi estus studinta Astronomion aŭ Teologion, se li pri tiuj fakoj, ankaŭ estus instruisto.

Kaj mi volas rimarkigi, ke mi diras «mi studis» anstataŭ diri «mi lernis», ĉar pri la unua vorto mi povas certigi, ke mi faris tion kun granda kaj vera intereso por atingi la plej eble grandan perfektecon, kaj pri la dua vorto, la mallerteco kaj ignorado pri la plej elementaj gramatikaj reguloj, malpermesis al mi la ellernadon tiel bone, kiel mia deziro estas. Malgraŭ ĉio, mi intencas daŭrigi la studadon ĝis tiom kiom mia kapableco permesas al mi.

Ĉar se la veron oni devas diri ĉiam—mi kredas ke jes—mi havas bezonon diri, ke kiam mi iris en la klubon por enskribi mian nomon, kiel lernonto por la komencota kurso, mia intenco estis nur koni novan aliaĵon pli--tre supraĵe kompreneble--kvan-kam kun la tutplena konvinko, ke mia ĉeesto en la klasoj, daŭrigus nur ne pli ol monaton, kaj la pruvo estis ke mi ne Fratecaniĝis ĝis kiam miaj ĉeestoj en la klasoj atingis preskaŭ du monatojn. ¶Plie, por lerni lingvon konatan nur de frenezaj kaj iluziaj viroj! laŭ opinio de multaj personoj, kiuj kompreneble, ne konis esperantan lingvon ĉar mi ĉiam kredis ke tiu opinio estis troega.

¶Sed nun estas la pli bona! Kia granda estis mia mirego, kiam mi rimarkis la nemalfacilecon kaj interesan lernadon kaj super ĉio la ekzistan realon de vera Internacia Lingvo, tiel necesa por la vivo de la Popoloj, ke mia modesta opinio supozas, ke ne estus la homoj tiel malbonaj kaj inter la Nacioj ne ekzistus disputoj, se la Esperanta Lingvo estus parolata de ĉiuj loĝantoj de la tero, kaj ili povus interkomprenigi la ideojn kaj pensojn de civilizitaj. Certe mi baldaŭ komprenis ke nune tio estis ankoraŭ belega idealo, sed estontece tiel brilega ke mi ne dubis eĉ momente, por liveri mian modestan helpon pri ĉio kion la Internacia Lingvo signifas.

Ankaŭ la boneco kaj ekzemploj de mia kara Profesoro konkiris mian volon. Ĉiuj fratecanoj konas kaj scias pri la granda estimindeco de Sro. E. Artigas, kiu estas la bonviro pri, kiu mi raportas. Ĉiam mi rememoros la vintrajn noktojn dum kiuj, eĉ se frostas aŭ pluvas, la sola kiu neniam mankis en la klasoj estis li. Kaj estas memoriginda la peno kiun por Sro. Artigas tio supozas. Ankaŭ estas certe, ke li tion faris kun tiu entuziasmo propra nur de vera apostolo de la Ideo.

Post tri monatoj mi sendis mian unuan Esperante skribitan poŝtkarton al germana kamaradino, petante al ŝi interkorespondon kun mi, kaj kia estis mia ĝojo, kiam post dek aŭ dekdu tagoj mi ricevis ŝian respondon, tiel afablan, ke mi jam ne ĉesigis mian interkorespondadon kun ŝi kaj aliaj diverslandanoj ĝis la momento kiam mi, pro aliaj devoj, ne povis daŭrigi—tre bedaŭrinde por mi—tiam interesan okupon.

Neniu kiu ne estu esperantema kaj ia foje interkorespondis, povos imagi la emocion kiun oni sentas, kiam la leteroj aŭ poŝtkartoj estas responditaj de personoj tiel diverslandaj, ĉar Esperanta Lingvo malaperigas la baron de aliaj lingvoj. Mia opinio estas ke ĉiuj kiuj lernis esperanton kaj atingis skribi ion, jam ne povas ne okupiĝi multe aŭ malmulte pri tio. Ĝi estas, plezuro tiel granda ke malfacile oni povas forlasi la interkorespondon kun samideanoj de ĉie, pri diversaj temoj.

Tiuj ĉi estis la cefkaŭzoj kiuj igis min daŭrigi tion kio komence estis por mi nur scivolemo kaj nune estas spirita bezono, tiel granda ke mia plej komplementa feliĉo estus povi atingi, per mia intelekto, decidojn deklarantajn deviga la lernadon de la Lingvo Esperanto en ĉiuj ĝeinfanaj lernejoj de la mondo.

JOSÉ M.^a UÑEZ.

Aŭgusto de 1931^a.

MIA UNUA VERKAĴO

(Daŭrigo)

Ili eliris el la dormoĉambro. Petro estis pensanta ĉu li devas iri por paroli hejmon de sia kunulo, ĉu li je ĉi tiu nokto nur devas esti patro.

La edzino plorante ekkriis: —Petro, vi devas serĉi kuraciston; nia filino estas treege malsana.

—Jes, mi iros tuj; restu apud ŝi kaj baldaŭ mi revenos kune kun la kuracisto.

Petro foriris kaj, pasante antaŭ la pordo de la domo de sia kunulo, li sentis timon kaj deziron eniri, kaj pensis: —Se mi gajnus multan monon, mia filino havus urban faman kuraciston kaj grandan komforton.

II

Estis la oka horo matene; neĝis kaj estis malvarmege; tra fenestrovitroj de la domo de Petro oni vidis ruĝan tukon, la morbilo estis manĝanta la delikatan korpon de la infanino, la patrino plorante maldolĉe parolis al najbaro tiel:

—Li iris hieraŭ nokte por serĉi la kuraciston kaj poste foriris por akompani lin kaj ankoraŭ ne revenis, eble okazis al ili malbonaĵoj ĉar dek minutojn post kiam ili foriris, komencis neĝi.

--Do mi iros ĉe la kuraciston, vi ne ploru kaj flegu vian filinon, eble li ne venis ankoraŭ ĉar neĝas.

—Sed ĉu li ne scias ke sia filino fartas malbone kaj vokas lin?

Li, la najbaro rajdis sur ĉevalo kaj ankoraŭ ne estis trarajdinta tricent metrojn kiam li vidis veni grandan amason da homoj portantaj svenintan viron.

Li demandis, kiu estas ĉi tiu viro?

Estas Petro via najbaro, ĉu vi serĉas lin?

Jes, lia edzino komisiis al mi serĉi lin ĉar li iris por akompani la kuraciston hieraŭ nokte kaj ankoraŭ ne revenis en lian hejmon; kio okazis al li?

—Malagrabla afero, Karolo la «Kuraĝulo» volis trompi lin.

—Kiel?

—Li, Karolo, volis ke Petro rabu la monon kiun la Sekretario de la sukerfabrikejo havas en sia kaso por pagi la laborulojn. Petro iris kun Karolo en la fabrikejo sed tie Petro, kiam estis prenonta la monon memoris ke li ĉiam estis ho-

nora viro kaj diris al Karolo: —Tio n ni ne devas fari, se ne ni estos rabistoj kaj kompreneble estos portataj en la malliberejon sen honoro kaj malproksime de nia familio.

PILAR SALVO.

(Daŭrigota).

SCIIGOJ

Nia kunsocietano Frederiko Martínez, kiu multe amas «Fratecon», eldonis poŝtkartojn kun anonco pri Esperanto kaj nia klubo. Ni devas respondi je lia favoro aĉetante tiujn p. kaj kies prezo estas unu peseto po dudek kvin. Petu ilin al nia pedelo.

La Lyona urbestro, kies prezidanto estas Mr. Herriot, decidis unuanime ke la ellernigado de Esperanto devas esti deviga en ĉiuj lernejoj de la tuta mondo, por faciligi la pacajn penojn.

Ni komencis novajn kursojn: Unu por virinoj klarigata de fraŭlinoj Salvo kaj Casasnovas; alian por viroj gvidata de s-ro Artigas; alia per poŝto, de s-ro Orós kaj fine, superan kurson kies profesoro estas s-ro Salas.

Ni multe dankas la agadon de la profesoroj kaj petegas al la novaj esperantistoj ke ili aliĝu al Frateco por helpi nin ĉe nia agado.

Pro manko de loko ni ne publikigas la nomojn de la mondonintoj je favoro de la familio de nia estinta fratecano s-ro. Floría. Ni faros ĝin en la sekvanta numero. Ĝis nun la monkollekto estas 640,75 pesetojn.

GRAVA!!

Ekzistas multaj esperantistoj kiuj forgesas nian lingvon pro ne legado de esperantaĵoj, eble ĉar ili ne havas sufiĉe da mono por aĉeti librojn aŭ por aboni gazetojn kies abonprezo ne estas laŭ sia monpovo. Precipe por tiuj ni faras NIA VIVO verkitan de pli ol dudek redaktoroj en kaj eksterlandaj. Ni faras, do, bonegan esperantan agadon. Du pesetojn po jare vi sendube elspezas je iu ajn ajo. Se vi amas nur iomete Esperanto'n demandu al ni kiel plej bone profite vi povos uzi tiujn du pesetojn kaj vi ricevos ĉiumonate NIA VIVO'n kiun vi povas kunporti komode en via poŝto, kaj en la tramo, en la kafejo k. c. vi legos kaj ne forgesos nian karan duan lingvon. Frateco plezurege elspezas sian monon por publikigi monate 750 ekzemplerojn kiuj iras tra la esperantista mondo. Se vi helpas nin, ni eldonos pliajn kaj pli ampleksajn. Venu al ni. Frateco atendas vin.